6-a JARO, N-o 304



LEIPZIG, 31. / 7. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

LONDONO – OKSFORDO

Estas sufiĉe signifa fakto, ke du universalaj esperanto-kongresoj okazos nunjare k preskaŭ samtempe en Grand-Britio, en la lando, kies lingvo estas plej multe disvastigita tra la tuta mondo.

Multaj homoj, eĉ laboristaj gvidantoj, ne malofte asertas, ke la angla lingvo plej taŭgas por solvi la problemon pri tutmonda interkompreniĝo. Kiuj dediĉis iom da tempo por lernadi tiun lingvon, tiuj tamen bone scias, ke tia aserto estas malprava. Fakte la lernado de la angla lingvo postulas elspezon de multe da tempo k energio. Ne nur pro ĝia malfacila prononcado, sed ankaŭ pro tio, ke ĝiaj vortoj havas multe da diversaj, ofte tre malsamaj sencoj. Sen ia troigo oni povas aserti, ke la angla lingvo estas almenaŭ dudekfoje pli malfacila ol esperanto.

Estas ja vere, ke pli ol tricent milionoj da homoj tra la tuta mondo povas pli malpli bone legi anglan tekston k angle komprenigi sin ĉe restoracio aŭ en hotelo. Sed kiom da ili kapablas verki en angla lingvo por gazetoj k paroladi angle dum kongresoj, kiel faras esperante simplaj laboristoj-SAT-anoj? Relative tre malmulte, inter tiuj, kies gepatra lingvo ne estas la angla.

Se por forigi la lingvajn barojn en la mondo, oni alprenus la anglan lingvon, estus elspezite almenaŭ miliardfoje pli da energio k tempo ol per alpreno de esperanto. Oni povus fari pri tio sufiĉe precizajn kalkulojn. La nombroj parolus tre elokvente k montrus, ke la nura racia solvo de l' problemo estas donita per artefarita lingvo, per esperanto.

La angla lingvo tamen povus sin trudi al la tuta mondo, se Usono k la Brita Imperio trudus sian regadon al ĉiuj ceteraj landoj. Tia hipotezo estas pensebla k iarilate eĉ allasebla. Sed pli saĝe, pli racie estas hipotezi, ke la tutmonda Proletaro unuiĝos super k malgraŭ la landlimoj por batali sur la *klasa kampo* por emancipiĝi el sub la jugo de l' mondkapitalismo.

Ne povas esti dubo, ke la SAT-anoj jam elektis la duan hipotezon. Por ke ĝi fariĝu reala fakto ili certe estas pretaj dediĉi tutan sian energion. En la unuiĝo de l' tutmonda Proletaro por la estontaj bataloj esperanto povas ludi grandan rolon k tial la kongreso en Londono havas tute specialan signifon. Ĝi estas fakta pruvo por ĉiuj laboristoj, kiuj deziras vidi k aŭdi, ke embrie la SAT-anoj funkciigas societon, kiel povus funkcii unulingva tutmonda socio . . .

En Oksfordo eminentaj profesoroj, reprezentantoj de Ŝtatoj k aliaj gravaj personoj provos per pompaj rimedoj altiri la atenton de la granda publiko pri la Zamenhofa kreaĵo. Per prudente k diplomatece verkitaj alvokoj ili sendube sin turnos al oficialaj rondoj kun peto pri agnosko de esperanto. Ili kredeble asertos, ke la alpreno de nia lingvo garantios la tutmondan pacon inter la nacioj, inter la suverenaj Ŝtatoj. Ili emfazos, ke esperanto neniel minacas la naciajn lingvojn, la naciajn kulturojn k. a. kvazaŭaĵn diaĵojn.

En la fama universitata urbo ĉio okazos laŭ "respektinda" maniero, kiel decas al homoj, reprezentantaj la burĝan regantan klason, kies potenco estas farita el senkompata ekspluatado al la laboristoj k el la bedaŭrinda rezignemo de ĉi tiuj lastaj, antaŭ maljusta sorto. En Oksfordo oni kantos himnojn al la kunlaborado inter la klasoj, t. e. de la ŝafoj kun la lupoj. Tie okazos ludoj, dancoj, intergratuloj. Estos bela, grandioza . . . amuzado.

En Londono kunvenos simplaj homoj el la ekspluatata klaso, homoj ardaj k pasiaj, ne ĉiam saĝaj k justaj, sed almenaŭ forte konvinkitaj, ke esperanto ne estas ia ludilo, nek ia universala kuracilo, sed estas nepre necesa ilo por ebligi al la tutmonda ekspluatataro forte unuiĝi por la venontaj, decidaj klasbataloj.

La SAT-anoj en Londono ne esploros, ĉu esperanto povas aŭ ne malutili la naciajn lingvojn k kulturojn. Tiaj problemoj ne interesas simplajn laboristojn, kiuj ne havas la eblon studadi dum jaroj en universitatoj por tiel akiri la kapablon ŝati, ĝuste taksi k profiti delikatajn kulturaĵojn.

En la ĉefurbego de Britio la laboristaj esperantistoj varme k pasie diskutos pri la plej bonaj rimedoj uzendaj por atingi, ke la laboristaj partioj k sindikatoj ĉesu ignori la mirindan interkomprenilon k unuecigilon, kia estas artefarita lingvo simpla k lernebla de ĉiu mezinteligenta proleto. En la granda Konŭe-Halo *(Conway-Hall)* la invititaj reprezentantoj de tiuj organizoj povos proprokule, proprorele konstati, ke la SAT-anoj perfekte solvis la problemon pri tutmonda interkompreniĝo per esperanto. Se tiuj reprezentantoj ne estas poliglotoj k dungitaj tradukistoj, kiuj havas personan intereson en tio, ke ne falu la lingvaj baroj, ili certe raportos al siaj organizoj, ke estas eble jam ŝpari konsiderindajn sumojn per la alpreno de esperanto por la rilatoj inter la diversnaciaj organizoj. Unuvorte ili konvinkiĝos, ke SAT faras pioniran, tre laŭdindan k subtenindan laboron.

En Londono kredeble ne regos la sama "respektindo" kiel en Oksfordo. Pli pasiaj estos la debatoj. Forestos pli malpli hipokritaj interlaŭdoj; forestos tradicio k rutino. Sendube ne ĉiuj kongresanoj havos klaran komprenon pri la movado, kiun ili partoprenas. Eraroj k miskomprenoj sekve estas ne-

eviteblaj. Sed la juna, dekjaraĝa organizo jam atingis sufiĉan forton por elteni firme kontraŭ iaj ajn ŝtormoj.

En Oksfordo la neŭtrala ŝipo senskue naĝetos sur kvieta maro; en Londono la SAT-ŝipo baraktos sur ŝaŭmantaj ondoj, sed malgraŭ tio, sperta okulo povos vidi, ke ĝia antaŭenirado estas pli rapida k ke ĝi atingos la havenon, evitinte la rifojn.

E. Lanti.

LA ABOMENA MILITISMO

Daŭras la vet-armado materia k spirita en la tuta mondo. Dum kirasŝipoj k tankoj estas konstruataj de grandaj k malgrandaj ŝtatoj en arda konkuro, ĉie laŭ iliaj povo k forto, k dum laboristoj en ĉiuj partoj de la mondo plue konsentas fabriki armilojn, municion, militgason, — samtempe en lernejoj, preĝejoj, armeoj, universitatoj, kinoj, sportejoj k aliaj publikaj k privataj institucioj estas preparataj la spiritoj por la venonta "lasta" milito. Parlamentoj voĉdone konsentas ĉiujare pli altajn militbuĝetojn.

Kaj al tiu "nobla konkurado" en la intereso de l' respektivaj patrioj hodiaŭ, same kiel en la jaro 1914, la laboristaj amasoj, samsortanoj laŭ la vivkondiĉoj, sed disigitaj laŭ lingvo k partio, scias kontraŭmeti relative nur malgrandan reziston. La kontraŭstaro kontraŭ la militpreparoj estas proporcia je la forto de l' klasbatalo en ekonomia kampo kontraŭ la mastroj, k dum tie ankoraŭ malvenke k en malfavoraj kondiĉoj batalas la proletaro, ankaŭ venko sur la ideologia fronto estas tute neebla. Ni mem, praktikantoj de mondlingvo, vidas pli ol aliaj, ke la kontraŭmilita edukado, la ribeligo de l' spiritoj kontraŭ la militismo ĉe la klasaj organizoj de la laboristaro estas (k povas esti) nur tute nesufiĉa, nekompleta, malmult-efika. Ĉu vi havas dubojn pri tio, ke en okazo de nova milito la plej granda parto el patriotaj militpartoprenontoj rekrutiĝos el laboristaj elementoj? Burĝojposedantoj, trustgvidantoj, fabrikmastroj kondutas pli inteligente, pli klarvide, k ili trovas ĉiam rimedojn antaŭgardi sin kontraŭ eventuala malbono, kiu povus trafi ilin mem per milito. Iliaj instrumentoj: reĝoj, ministroj, diplomatoj k deputitoj, profesoroj, instruistoj, pastroj k junulargvidantoj, laboras je ilia servo, laŭ ilia komisio. La ŝtormaj postmilitaj ribeljaroj, tiu longa k laŭŝajne profunda protesto kontraŭ la buĉado, forpasis, k juna generacio, esperplena, malsperta,



Originale por "S-ulo".

fidema k sensuspekta, ensuĉas la instruojn pri naciismo . . .

Tamen . . . ne tute identas la situacio kun tiu el unuaj aŭgustaj tagoj de l' jaro 1914. Nova faktoro ja ekaperis sur la scenejo de l' mondteatro. La rusaj kamparanoj k laboristoj en soldat-uniformo sukcesis ja sub gvido de l' bolŝevikoj transformi la imperialisman militon en civilmiliton. Kaj tiuj samaj amasoj, formantaj la kadrojn de Ruĝa Armeo, kontraŭbatalis la blankajn invadintojn, kiuj deziris sufoki en embria stato la naskiĝantan Sovetion.

Tiu armeo el laboristoj k kamparanoj, kiu en tiama tempo sciis venke rebati la atakojn de l' kapitalistarmeoj, tenas ankoraŭ hodiaŭ en respekto la registarojn de l' grandaj potencoj, kuraĝigas la klaskonscian laboristaron, admonante k instigante ĝin per la simpla fakto de sia ekzisto persisti en klasa batalo, en batalo kontraŭ militarmado k militbuĝetoj.

N. B.

Neniu esperantisto plu rajtas fuŝe uzi la lingvon, de kiam aperis la

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

Volumego de 536 pĝ. en formato 14 × 20 cm.
Prezo: bindita ekzemplero 10 mk. g.
broŝurita „ 9 „ „
Nur por aktivaj membroj (t. e. membro-abonantoj) de SAT validas rabato de 20 % je tiu ĉi verko.
Mendu ĉe Adm. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 aŭ Direkcio de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

ANKAŬ EN PORTUGALIO ONI MILITPREPARAS!

Lisboa SAT-ano (12199)

Feliĉe nia estraro jam komencas sin turni al la demando, kiu plej grave interesas nian "patrion", tiu de l' patridefendo okaze de milito. Ni ja posedas tre grandan, boninstruatan k "bonege pagatan" armeon. Sed bedaŭrinde mankas ĝis nun la plej necesa materialo, tiu por la mar-armeo, precipe militŝipoj. Laŭ raporto de vespera gazeto *"Diario de Lisboa"*, la nuna ministro por maraferoj ellaboris tre koncizan programon, kies kopion li disdonis al la ceteraj ministroj. Ĝia plenumo solvos tre kontentige la jam delonge starigitan problemon. Laŭ tiu programo la ŝtato akiros dum la estontaj 8 jaroj ne-malpli ol 42 militŝipojn, kies kostoj sumiĝas je 12 milionoj da libr. (1 libr. = ĉ. 5 usonaj dolaroj). Kia bagatelo! La akiro estos farata en 4 periodoj laŭ jena plano:

1-a periodo: 2 milit-avertŝipoj po 2000 tunoj, 4 samspecaj po 1000 tunoj, 4 kontraŭtorpedo-ŝipoj po 1500 tunoj, 2 submaraj ŝipoj po 800 tunoj, 2 kontrol-ŝipoj por fiŝkaptado k 1 transportŝipo por 12 aviadiloj.

2-a periodo: 1 kirasŝipo je 5000 t., 2 kontraŭtorpedo-ŝipoj po 1500 t., 4 submaraj ŝipoj po 800 t.

3-a periodo: 1 kirasŝipo je 5000 t., 2 militavertŝipoj po 2000 t., 2 samaj po 1000 t., 2 kontraŭtorpedo-ŝipoj po 1500 t., 2 submaraj ŝipoj po 500 t.

4-a periodo: 2 milit-avertŝipoj po 1000 t., 4 kontraŭtorpedo-ŝipoj po 1500 t., 4 submaraj po 500 t., 1 militapogŝipo por submaraj ŝipoj.

Ĉu ne kontentige? Se mi povus, mi tuj proponus, ke anstataŭ 12 milionoj da libr. oni elspezu 20 aŭ eĉ 40 milionojn, por akiri pli da militŝipoj, ĉar ju pli granda la armeo, des pli konata fariĝas la lando. Tute ne gravas, ĉu la popolo malsatmortas. Tio ja estas bagatelo. De infanaĝo mi aŭdas portugalan proverbon, kiu diras "Mortu la popolo, sed restu la gloro". Kia ĝojo, kia ĝojo! Ĉu estas malsato? Loĝeja krizo? Ĉu pligrandiĝas senlaborulamaso? La nombro da ĉiutagaj memmortigoj pro mizerego ktp? Tio tute ne gravas. Unue oni solvu la problemon pri patridefendo. La malsata popolo atendu la alvenon de l' ŝiparo, k poste per kugloj k grenadoj ĝi estos satigata. Ĉu ne estas preferinde, anstataŭ esti kondukataj al la kolonioj kiel ŝarĝo, ke la politik-sociaj malliberuloj estu transportataj tien per nova k bela militŝipo? Kiu neas la pli grandan lukson? La ŝtato bone scias pri la granda senlaborul-amaso, sed paciencigu ĝis la alveno de l' ŝiparo, k dume

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"

iru en restoracion, kie manĝas la veraj patriotoj, postulu de ili la ostojn, kiujn ili lasis, k satigu vin per ili!

Aliflanke, ĉu nia lando ne estas fame konata kiel lando de plej grandaj naturbeloj, verdaj k tre ĉarmaj kampoj k herbejoj? Ĉu nia ĉielo ne estas la plej bela el la tuta mondo? Ĉu suno k steloj starantaj super ĝi ne estas plej brilaj? Tion ja asertis niaj plej eminentaj verkistoj! Kial do plendi pro manko de loĝejoj? Oni loĝu en la aero, sed ne forgesu savi la patrion! Laŭ nia nacia historio Portugalio estas lando de herooj k eltrovintoj, k kiel tia konata tra la tuta mondo. Al ĝia ekzemplo sekvis la aliaj popoloj. Ĉu ni do perdu nian bonan reputacion antaŭ la mondo? Ne, milfoje ne! oni respondos. Sed ĉu ne estas aliaj pli urĝe solvendaj problemoj, kiel tiu pri la vivkondiĉoj ktp.? Tute ne! Vere, la vivo fariĝas pli k pli suferiga, ĉar la prezo por vivrimedoj pligrandiĝas senĉese. Sed tio ne gravas. Delonge la laborularo ne laborakiras sufiĉe por duonviveti. Do, se la vivo eĉ fariĝus pli kara, tio ne gravas, ĉar tiu kareco nur ŝarĝos la monposedantajn "patriotojn". La laboristoj jam delonge estas mortkondamnitaj, ĉu je morto per malsato, per kugloj okaze de ribelo, aŭ per malliberejo, ĉu per memmortigo, se preferata. Sed neniel dubu, ke morgaŭ, okaze de nova milito aŭ eĉ simpla ribelo, la plej granda parto el tiuj malriĉuloj "ne nur laŭ mono, sed laŭ kapablo k scio", tuj aliras ĉe la registaron por oferi tre volonte sian vivon k savi la patrion. Do, estu ni kontentaj k — denove "mortu la popolo, sed restu la gloro".

PUBLIKA LETERO AL LA LITERATURA KOMISIONO

Nia SAT-libro-eldonejo jam aperigis atendindan nombron da bonegaj esperantaj libroj. Estas ankoraŭ gravaj manuskriptoj—originaloj k tradukoj—kiujn la Lit.-Komisiono tralegis, korektis k rekomendis por eldono. La ĝis nun eldonitaj libroj estas verkoj de unuopaj verkistoj, granduloj en politiko, scienco k literaturo.

Sed hodiaŭ mi proponas eldoni kolektivan verkon, je kiu la tuta SAT-anaro kunlaboru: mi proponas eldoni verkon kontraŭ la milito. Ekzistas jam multaj literaturaĵoj kontraŭmilitaj, versaĵoj, romanoj, dramoj — de unuopaj verkistoj en naciaj lingvoj. La militon ne partoprenis kelkaj, sed multaj k ili travivis epizodojn, kiuj estas indaj por konigi ilin al la mondo, al estontaj generacioj por abomenigi la kruelan militon. Kontraŭmilita kolektiva verko en esperanta lingvo, kiun verkos sennaciularo, certe estus epokfaranta libro.

La tuta SAT-anaro partopreninta la militon ĉe la fronto, en la postfronta regiono k enlande, kunlaboru. Rakontu pri la sinteno k ĉikanoj de la oficiroj kontraŭ la senranguloj, pri la luksa vivo en la postfronta regiono, pri malsato en la lando, pri la agoj de la regantoj kontraŭ strikantaj laboristoj, pri la glorigo de la milito fare de pastroj, pri la mensogema gazetaro k la cenzuro, pri nutraĵ-surogatoj; pri ĉikanoj kontraŭ la enloĝantoj de okupitaj regionoj, pri sensencaj militaj entreprenoj por ricevi ordenojn je la kostoj de vunditaj k mortpafitaj soldatoj, pri polico, pri la interna politiko, pri la seksa vivo en milito ktp.

La enhavo de la libro devus esti ordigita laŭ jenaj ĉapitroj: Ĉe la fronto — La vivo postfronta — La laboristoj — La virinoj — La gazetaro k la cenzuro — La polico — La interna politiko — La malsato k la nutraĵ-surogatoj ktp. Krome oni dividu la unuopajn ĉapitrojn laŭ nacioj; ekzemple: Rakontas franco, Rakontas germano ktp. Tiel oni povas fari komparojn. Per ilustroj — niaj K-doj certe disponas pri trafaj bildoj k fotoj — oni povus pliriĉigi k pliinteresigi la verkon. Ĉiu ĉapitro estu enkondukata per pensoj de famuloj.

Per eldono de tia verko la mondo pli ol antaŭe atentos nian movadon k ĉu ni ne eĉ profitus per eldono de tia ampleksa libro, se ni trovus nacilingvajn eldonistojn? Ĉu ni en la jubilea jaro de SAT volos efektivigi la planon? Grandega estas la laboro. La Lit. Komisiono parolu! *K. H. (3550).*

DISKUTEJO

Al K-do Marso pri militoj[1]

En n-o 296 vi estas preskaŭ certa, ke nova milito venos. Malgraŭe, vi proponas forbruligi ĉiujn primilitajn verkojn, malpermesi al infanoj legi ĉi rilatajn librojn. Ĉu via propono estas realigebla? Ĉu vi havas la potencon, ke ĉiuj verkoj primilitaj estu bruligataj? Ĉu vi, nur en la grupo aŭ en la urbo, kie vi vivas, povas al infanoj malpermesi legi ion k ĉu la infanoj vere ĉi tion ne legas? Eble, ke vi en parteto de l' mondo sukcesos. Sed ankaŭ vivas krimuloj, kiuj militos, se necesas, sen libroj, kiuj atakos la juston, la juste k paceme vivantajn homojn, k kiuj forbruligis la scion de defendo, tiuj nekapablas militi por la justo k estos mortigitaj. La justemaj homoj sen potenco, sen kapablo kontraŭmiliti la malamikojn de l' justo . . . tio signifas pludaŭradon, eĉ eternon de maljusto.

La demando ne estu, ĉu milito estas bona, morala aŭ ne, ĉar la juĝanto devas scii pri la celo de l' milito. Ni demandu, ĉu tiu aŭ tiu ĉi milito servas batalon por la justo. La batalantoj, kiuj ŝirmas malfortulojn, kiuj kontraŭstaras la ekspluaton, kiuj rompas la jugon de l' tirano, kiuj defendas la regon de l' justo, se necesas, per armilo en milito (aŭ ĉu vi volas spirite, ignorante, nude kontraŭi la konkretajn militilojn de l' malamikoj de justa sociordo?) ĉu tiuj batalantoj "ruĝaj" estas malbonfaruloj? *MOR (14 624).*

[1] Vd. n-on 296, pĝ. 410.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Proceso kontraŭ 113 kompartianoj en Tokio

Proceso kontraŭ 113 komunistoj arestitaj okaze de l' granda arestado je 15. marto 1928 komenciĝos baldaŭ. Ili estas nur parto el la arestitoj, kies nombro jam atingis pli ol 850 dum ĉi tiuj du jaroj. La klasa justo minacas ilin per puno de 2—10-jara enkarcerigo.

Kiel rezulton de enketo pri 471 arestitoj oni publikigis jenajn nombrojn:

1. Aĝo de kompartianoj:		
knaboj (ĝis 20 j.)	34	6,4%
junuloj (21—30 j.)	383	81,3%
plenaĝuloj (pli ol 31)	54	11.3%
2. Sanstato:		
sanaj	285	60,5%
nefortaj	75	18 %
malsanaj	111	21,5%

El la malsanuloj, tuberkulozaj (34), beriberaj (10), malsanaj je digestaj organoj (22) estas plej multaj, k veneraj malsanuloj (5) estas tre malmultaj, kvankam 70% el la arestitoj estas ne edziĝintaj.

3. Edukastato:		
elementa edukado	258	55%
meze edukitaj	81	17%
alte edukitaj	132	28%

Tiuj, kiuj estas edukitaj en universitatoj, atingas 100.

4. Vivstato:		
malriĉaj	341	72,8%
ordinaraj	91	19,3%
riĉaj	39	8,3%
5. Intelektuloj	132	28%
Laboristoj k kamparanoj	339	72%

Laŭ "Scienco Proleta" (n-o 7), Tokio.

La **16**-paĝa
NUMERO 300-a de "S-ulo"

Ikun siaj original-artikoloj pri nia movado, siaj belaj ilustroj, arta prezento estas la plej taŭga varbilo en la manoj de grupgvidanto k propagandisto!

MENDU por 0,20 mk. g. po ekzemplero (rabato de 30% ĉe mendo de minimume 5 ekz.) ĉe ADMINISTRACIO DE SAT, LEIPZIG O 27.

TRA ESPERANTIO

VOĈOJ EL SOVETIO

Sur la vojo de SAT k "S-ulo" aperis rifo... La financa situacio de SAT estas en danĝero. En n-oj 299, 300, 301 de "S-ulo", n-o 9 de "LNE" la Direkcio klarigis tiun danĝeron per *malpermeso* de sovetia registaro transpagi la monon al SAT, "malpermeso" kaŭzita per rusto ĉe sovetia ŝtata aparato, la rusto, kontraŭ kiu batalas sovetia proletaro; la Direkcio esperas ekscii la kaŭzojn eble pli poste, sed ĝi opinias, ke unu el tiuj kaŭzoj estas la nesufiĉa k neĝusta informado pri SAT ĉe la koncernaj instancoj en Moskvo. Inter la voĉoj de SAT-anoj, publikigitaj en "S-ulo" n-o 301, ni legas pri "fiagoj" de sovetiaj SAT-anoj; la Direkcio esprimas ankaŭ sian opinion, ke la financa krizo de SAT estas parte kreita per nedeziro[1] de SEU presi en Moskvo SAT-librojn, kelkfoje (12. 2., 30. 4., 27. 5.) menditajn de la Direkcio al SEU.

La konkludon devas fari la leganto mem, sed la ĉefa konkludo nepresita estas sentata en ĉiuj ĉi komunikoj de la Direkcio: ekzistas iu kulpulo malamika al SAT, k tiu kulpulo estas SEU, pasintjare akuzita de la Direkcio pri la intenco skismigi SAT.

Permesu al mi, kiel SAT-ano, longe batalinta por la prospero de SAT, aŭdigi mian voĉon, por prezenti al la SAT-anaro la faktojn por objektiva prijuĝo de la situacio. Mi penos esti konciza. Se mi estos longa — oni min pardonu: multon mi bezonas por rebati k pliprecizigi.

Malgranda enkonduko, necesa por komprenigi la cirkonstancojn de la tuta afero: La tuta Sovetia ekonomio efektiviĝas laŭ certa plano, fiksata k konfirmata de koncernaj superaj institucioj. Ankaŭ SEU devas ellabori por ĉiu jaro similan planon, kiu en fakoj rilatantaj al certaj ekonomi-mastrumaj agoj konfirmiĝas de pli altaj instancoj. Tiamaniere, ekz., estas konfirmata la eldonagada plano de SEU (la presejo uzota, kvanto da papero uzota por presaĵoj aperigotaj, ĝenerala enspezo de la librovendado ktp.). Same necesas al SEU fiksi laŭplane la sumon transdonotan al eksterlando k interalie — al SAT. Tiu sumo konfirmata de la Financa Popolkomisario formas parton de la tutsovetia financa plano, koncernanta enkasigojn el eksterlando k transpagojn eksterlanden. Dum la lastaj du jaroj (1928/29 k 1929/30) estis fiksita por SEU la sumo de 5000 dolaroj ĉiujare, el ili 4500 dol. por SAT k 500 dolaroj por abonoj al tiu nikaj gazetoj esp-aj (IPR, IMR ktp.) k por mendo de esp. libroj ĉe alilandaj eldonejoj. Nunjare en la sumon de 4500 dol. eniris ankaŭ la sumo de 500 dol., necesaj por ebligi al sovetiaj SAT-anoj pagi la veturelspezojn al la SAT-kongreso, do por SAT restis nete 4000 dol. Jam en vintro de la j. 1928 evidentiĝis, ke tiujara sumo ne estas sufiĉa por transpagi la mendojn de sovetiaj K-doj al SAT. Tial ni iniciatis k insistis, ke la Direkcio konsentu pri presado de kelkaj SAT-libroj en Moskvo por tiel pligrandigi la sumon transpagotan al SAT. Mia insistado havis sukceson k en Moskvo estis presitaj 5 libroj de SAT, el ili *nur unu* plene je la kosto de SAT k la 4 ceteraj — nur parte je ĝia kosto, ĉar *CK SEU prenis sur sin parton de la eldonkostoj* kun la intenco mone subteni al SAT.

Aŭtune de la j. 1929 mi denove komencis ataki la admin. de SAT pri la neceso presi denove kelkajn SAT-librojn en Moskvo, ĉar evidentis, ke la valuto prezentita ne sufiĉos por la transpago de la tuta SAT-mono al Leipzig. Mi skribis pri tio 27. okt. 1929, substrekante, ke "ankaŭ la Direkcio komprenu tiun *neceson* (de la presado en Moskvo)"; mi devis substreki, ĉar ĵus antaŭ tio la Direkcio petis ĉe la Konsilantaro rajtigon presi librojn en plej malkara presejo k eĉ per neniu vorto klarigis la neceson presi kelkajn librojn ankaŭ en Moskvo. La 27. nov. mi denove skribis pri la samo per similaj vortoj k krome proponis transporti al M. presadon de "LNE", kio ŝparus al Leipziga kaso proks. 5000 mk. g. jare[2]. Sed mi avertis en la sama letero, ke ĉar pro nia teknika presejostato povas esti rompita la regula apero de "LNE", do eble pli bone ĝi estu presata en Leipzig 16-paĝa, k la aldonaj 16 p., subvenciataj de SEU, estu presataj en Moskvo, en formo de libroj, senpage sendataj al la abonantoj de "LNE". Fine, la 4. feb. 1930, responde al la informpeto de la Direkcio, mi komunikis al ĝi pri la konsento presigi "LNE" en Moskvo, komencante de okt. 1930. Per sama letero mi ree petis la Direkcion "pripensi la presigon en Moskvo de kelkaj SAT-libroj".

La Direkcio konfesis, ke ĝi unuafoje skribis al SEU pri libropresigo en Moskvo nur 12. feb. 1930, do jam post kelkaj miaj leteroj, signalintaj la neceson de tiu paŝo[3]. Sed la Direkcio forgesis klarigi al la SAT-anaro, kion nome ĝi per siaj 3 leteroj mendis presi en Moskvo. La sola manuskripto por eldono estis tiu de Hartvig "Kosmopolita Ideo", sendita al mi printempe 1929. Jen estis sola mendo. Sed tiu manuskripto ampleksega venis al mi neprespreta: eĉ lingve ĝi ne estis korektita, ne parolante jam pri la rapidskribo per kelkaj manoj de div. tradukintoj, pro kio la manuskripto eĉ estis kelkaloke nelegebla. CK SEU akceptis siatempe tiun mendon por presigo en Moskvo k protokolis sian decidon tiurilatan 6. majo 1929, en protokolo n-o 8, p. 2-d.

Kulpas pri ĝia neeldono sola mi persone, kiel administranto de eldonfako ĉe CK SEU? Mi ne plenumis tiun decidon de SAT k SEU, unue pro la malbona stato de la manuskripto k due — mi tion konfesas sincere — ĉar mi opiniis pli valora presi en M. literaturaĵojn (k tion mi substrekis en ĉiu mia letero), ĉar ili estas pli facile vendeblaj, do pli rapide realigos la montranspagon al SAT. Nu, mi pekas pri tiu mia kulpo, ĉar ĝi malhelpis malkreskigi la ŝuldon de SEU al SAT k ĉar per tio mi ebligis al la Direkcio nun kulpigi SEU pri la neplenumo de

[1] *Per konstato. — Direkcio de SAT.*

[2] *La propono pri eventl. presigo de "LNE" en Moskvo ne estas al ni farita de K-do Demidjuk, sed, male: ni demandis al li per let. de 21. 12. 29, laŭ propono de nia Administranto, ĉu ne estus eble estonte presigi "LNE" en M. Al tiu nia let. ni ricevis la (konsentan) respondon nur (kiel K-do Dem. mem diras) je 4. 2. 30, t. e. pli ol 6 semajnojn pli malfrue! Cetere la let. de 27. nov. neniam trafis en niajn manojn.*

[3] *Strange estas, ke tiuj "kelkaj leteroj" (per kio K-do Dem. aludas al iuj let. de 27. 10. k 27. 11. 29) neniam atingis nin! Se ni ne admonis pri plua presigo de libroj antaŭ la 12. 2. 30, tio okazis, ĉar ni devis supozi, ke la Moskva presejo estis dume okupita pri la presado de "Kosmop. Ideo", kies vico de presado, kiel K-do Dem. mem konfesas, venis delonge. Tiel ni respondis ankaŭ al demando de K-do Rublov, tiama sekretario de Literat. Kom.: "Kiam aperos Hartvig-verko pri Kosm. Ideo?" je 20. 11. 29, ke ni sendis ĝin por presado al Moskvo en marto 1929, k same al K-do Kolĉinski en Ĥarkov, unu el la tradukintoj, kiu demandis nin pri la longe atendita fina presigo de l' verko en febr. 1930.*

Laŭ peto de kelkaj K-doj ni alvokas, ĉu estas inter la Kongresontoj unu, kiu povus bone montri la tiom laŭditan Ĉe-instrumetodon? Se jes, li senprokraste konigu sian nomon al la Organiza Kongres-Komitato.

SAT-mendoj. Aliaj mendoj — mankis, aliaj manuskriptoj por eldono mankis[4] k nur per let. de 25. junio 1930 la Direkcio komunikis, — presu ion ajn, ĉu Stalin, ĉu Puŝkin, ĉu Casanova de Nekrasov, nur presu urĝe.

Ve, iom malfruis tiu komuniko. Ne ĉar SEU ne plu deziras presi SAT-librojn, sed ĉar SEU mem spertas nun grandajn teknikajn malfacilojn rilate la libropresigon[5]. Sufiĉas diri, ke dum 6½ monatoj pasintaj en la n. j. ĝi sukcesis aperigi pro troŝarĝo de la presejo nur unu n-on de sia revuo "Intern. Lingvo" anstataŭ 3 . . . Kiu deziras scii detale la kialojn — legu mian artikolon pri tio en n-o 8/9 de "Bulteno de CK SEU". Pro la samaj kialoj malfruiĝis apero de "Senn. Ped. Revuo" n-o 2 (aperonta post 5—6 tagoj) k de ĝia n-o 3, ankaŭ jam delonge kompostita. Cetere estas tute stranga la supozo de la Direkcio pri la kvazaŭa intenca prokrastigo de tiu revuo: ja ĝi estas eldonata ne per la mono de SAT, sed per la mono de SEU. SAT pagis nek unu dolaron por eldono de tiu revuo, nek pagos en estonto — celante helpi disvolviĝon de SAT, SEU proponis al SAT eldoni la revuon, ne enmiksante sin en ĝian redaktadon, je sia mono. Pri tio atestas leteroj miaj al K-doj Boubou k Lerĥner (26. 12. 29), konfirmantaj, ke CK SEU pagos je sia kosto la tutan deficiton, rezultontan el la eldonado de tiu revuo[6].

Nun pri la fama "malpermeso" de Sovetia registaro transpagi la monon al SAT. La grandiozaj streĉoj de Sovetio por efektivigo de sia kvinjara konstruplano, por sia ekonomia emancipo de la ŝtatoj kapitalistaj — kaŭzis, ke en eksterlando stariĝis komploto por malhelpi al vendo eksterlanden de sovetiaj varoj (ekz. en Germanio la sovetaj alumetoj). Tial la tuta financa plano de eksterlanda agado en la komencaj monatoj de la j. 1930 estis rompita k Financa Popolkomisario estis devigita en mezo de la j. 1929/30 por pli multaj fakoj malgrandigi je 50% la laŭplanan eksporton de la mono eksterlanden. Tio okazis ankaŭ kun SEU, same kiel kun IRH[7] k. a. organizoj. Ĉar SEU jam je 50% eluzis sian rajton sendi monon eksterlanden (de post 1. okt. 1929 ĝi transpagis diversmaniere al SAT 11 500 mk. g.), fakte nun ĝi ĝis okt. 1930 povas ekspedi al SAT ne unu dolaron.

Do, ne estis iu speciala por SAT "malpermeso", kiel ŝajnigas la Direkcio, estas nur ĝenerala decido de la registaro rilate la valutplanon, decido kiu koncernas ne nur SEU, sed ankaŭ multajn aliajn sovetiajn organizojn. Kaj pri tiu decido kulpas ne iu rusto de sovetia ŝtat-aparato, sed la financa batalado de kapitalismaj ŝtatoj kontraŭ USSR. Kaj SEU ne povas transpagi ne nur al SAT, sed ankaŭ abonojn al IPR, IMR, PEK ktp. Ĉiaokaze SEU en limoj de siaj povoj pretas fari por SAT ĉion por kompensi la ŝuldon ekzistantan; tuj ĉe la unua eblo la ŝuldoj estos regulitaj.

Por ke K-doj juĝu, kiom objektiva estas la aserto de K-do 2978, la nova plenum-komitatano de SAT, ke SEU prunteprenis ĉe SAT la monon, ke SEU sidas sur la ŝultroj de SAT, mi citu, ke je la 1. julio 1930 ĉe la konto kuranta de CK SEU ĉe Ŝtata Banko troviĝas la sumo de 34 064 mk. g.; do forpreninte de tie la SAT-monon, SEU havas liberan rezervon de pli ol 18 000 mk. g. por sia agado, ne kalkulante jam la pagitajn eldonkostojn de Senn. Ped. Revuo. Necesas aldoni, ke SEU mem de neniu ricevis subvenciojn k ke SEU en ĉiuj siaj eldonoj plej vaste reklamis tute senpage dum pluraj jaroj SAT-eldonojn en amplekso, kiel neniu alia landa lab. esp. asocio.

Se SEU vere ne subtenis fakte "LNE", kiel asertas direkcia komuniko en red. angulo en n-o 9 de tiu revuo, do la ŝuldo de SEU al SAT malgrandiĝus je 4800 mk. g., ĉar ja SAT skribis en la ŝuldon de SEU ĉiumonate 200 mk., malgraŭ ke dufoje la revuo aperis duonamplekse k sekve la 200-marka subvencio dum tiuj monatoj ne estis necesa[8]. Tion la Direkcio de SAT povis forgesi, sed mi neniel povas kompreni, kiel ĝi povis forgesi pri la dufoja propono, farita ĉe CK SEU per mi en let. de 8. 6. n. j., kiu tekstis: "LNE" provizore aperu 16-paĝa. La mankantajn 48 aŭ 64 pĝ. la abonantoj ricevos per "Almanako de LNE", presota en Moskvo je la kosto de CK SEU. Se ni ne sukcesos de okt. reguligi la montranspagon aŭ la presadon de "LNE" en M., ni en estontaj jaroj eldonos en M. 192-paĝan "Almanakon", kiun eniros pli grandaj noveloj, skizoj ktp., k kiu estos senpage dissendita al la abonantoj." La Direkcio prisilentis tiun proponon ne nur en "S-ulo" k "LNE",

---

POR EVITI LA RIFON

2. LISTO:

Jief 10 fr. fk., Kongresano 10 fr., Kaŝon 5 fr., Hujucz 10 fr., Lorquet 50 fr., Cun . . . 5 fr., Peter 5 fr., Senlaborulo 5 fr., Waller 5 fr., Vitezak 5 fr., A. Pâris 5 fr. — Sume: 115 fr. fk.

---

[4] *Tiu aserto ne estas ĝusta. K-do Dem. povis legi en n-o 249 de "S-ulo" (je 11. julio 1 9 2 9 !), pĝ. 412, ke ĉe la tiama Lit. Kom. en Odeso troviĝas jenaj kontrolitaj, sekve prespretaj manuskriptoj (krom "Kosmop. Ideo", jam en Moskvo, k "Zamenhof" de Drezen, dume presita ekstervice): Ford aŭ Marks (Walcher), Rakontoj pri Kamparo (el ukraina lit.), Kiel homo formis sian dion (Simmel), Skizo pri ekonomia geografio (Ĥorrabin). Sufiĉus do, ke K-do Dem. sendu poŝtkarton al Odeso por provizi la presejon en Moskvo per SAT-manuskriptoj! Se estis tiom nelegebla la manuskr. de "Kosmop. Ideo", kial do Dem. ne skribis al unu el la tradukintoj, ekz. K-do Kolĉinski, kiu loĝas ankaŭ en Sovetio, k senpacience atendis la presigon de l' libro, por rekopii la nelegeblajn partojn? . . . aŭ almenaŭ atentigis nin ĝustatempe pri tio, por ke ni zorgu pri rekopiado?*

[5] *Dume pamfletoj k. a. verkoj presiĝas regule k seninterrompe por Komunista Biblioteko. Ekzemple en Bulteno CK SEU (n-o 6/7, apr./majo 1930) ni trovas anoncon pri* 5 *esp-lingvaj libroj, kiel aperantaj en sola monato junio, 3 inter ili el la serio "Kom. Biblioteko". Du el ĉi lastaj la red. de "S-ulo" jam ricevis por recenzo k unu el ili ampleksas 120 paĝojn!*

[6] *Dume la reputacio de SAT kiel organizo liveranta akurate al la abonantoj siajn gazetojn tre domaĝas pro tia fuŝaranĝo.*

[7] *Ni devas rimarkigi, ke nenia komparo estas farebla inter IRH k SAT. La unua organizo ja ne liveras varojn al Sovetio, dum SAT liveris ("S-ulo"n, Jarlibron, "La N. E."-on ktp.). Sola komparo farebla estas jena: Por ricevi maŝinojn k. a. varojn Sovetio pagas al kapitalistaj firmoj, kial do ĝi ne same konsentus pagi al laborista organizo, kiu ankaŭ liveras utilajn varojn? Ni estas konvinkitaj, ke la Soveta Registaro konsentus pagi la sumon ŝuldatan al SAT, se ĝi estus ĝuste informita pri nia organizo.*

[8] *SEU ne nur fakte ne pagis por la plusaj paĝoj de "LNE", tiu per grandioza gesto konsentita subvencio, — sed eĉ se ĝi pagus la fakturojn, tio ne kompensus la malgajnon, kiun kaŭzis al nia kaso SEU, kiam ni dum la jaro 1926 presigis "S-ulo"n en Francio, k SEU ne pagis dum longa tempo monon ĝis tro malfrua dato, kiam la inflaciperiodo en Francio estis finita k la franko stabiligita.*

OKAZE DE LA KONGRESA SEMAJNO

ne aperas n-o de "S-ulo", ĉar, kiel ĉiujare, redaktoro k administranto veturas al la Kongreso. La venonta n-o aperos je 14. 8. en amplekso de 12 paĝoj.

sed eĉ en sia protokolo k cirkulero al la Konsilantaro[9].

Finante, mi ne povas silenti pri la prop. 7 al la X-a Kongreso, proponita k defendita de L. Revo (Lora) k akceptita de Pariza SAT-anaro? Kion celas tiu propono, K-doj bone komprenos, se ili rememoros ke nome ĝian aŭtoron en mia parolado ĉe Leipziga SAT-kongreso mi nomis per akra vorto "politikistaĉo", ĉar nome li, iniciatinte k verkinte siatempe la faman programon de SAT, en la pasintjara somero insistis, ke jam venis la tempo skismigi SAT k ke por tio la programprojekto plej bone taŭgas[10]. Se tiu homo deziras nun uzi "S-ulo"n por informi "ankaŭ pri la mispaŝoj k malbonaj rezultoj de la politiko de la sovetiaj regantoj" (ŝategata temo de ĉiuj kapitalistaj gazetoj!), ni havas por li simplan respondon: en Sovetio regas laborista klaso per sia avangardo — la partio, k ĵus per la fortega demonstracio okaze de la XVI-a partikongreso sovetia proletaro ankoraŭfoje esprimis sian plenan fidon k subtenon al la gvidado k direktado de la lando. Al la provoj skismigi SAT ni starigu unuecan laboristan fronton de proleta solidareco! *G. Demidjuk (1516).*

Ni ne aldonos komenton al la diroj de nia K-do Demidjuk. Neniam cetere ni dubis, ke li estas fervora k lojala SAT-ano. Ni nur memorigu, ke en la n-o 301-a ni mem diris ĉe la fino de niaj klarigoj, ke ni konservas la esperon, ke finfine tiu monafero kontentige aranĝiĝos. Se ni ne havus tiun esperon, nia sinteno antaŭ la ekstersovetia SAT-anaro estus ja nepravigebla.

Ĉiuj legantoj ankaŭ bone komprenos, ke pri tiu afero ni devis permesi al la SAT-anoj, ke ili diru sian opinion. Tial ni aldone ankaŭ konigas la opinion de du Sovetiaj K-doj, kies nomojn ni laŭ la deziro de niaj informantoj ne citas, sed estas evidente, ke ni konservas zorge la koncernajn leterojn, senditajn por publikigo, k ke ties aŭtoroj estas SAT-anoj. Por ne misuzi la lokon, ni publikigas nur malgrandajn partojn el tiuj leteroj k eĉ ne la plej drastajn.

"... Miaopinie vastaj amasoj ne povas aprobi la agadon de l' K-doj E. Drezen k. a., kiuj sole, nure malhelpadis al SAT per tuta sia nuna agado. Eldonaĵoj de CK SEU estas uzataj por kontraŭbatali la gvidadon de SAT k ĉiujn ne povantajn konsenti kun ĝenerala sekretario de CK SEU, K-do Ernesto Drezen ... Laŭtaj vortoj iliaj tute finfine ne malhelpos al SAT-anoj veraj k bonpensantaj plenumi sian devon antaŭ Revolucio k Proletaro.

"Kiel vicperanto mi tute aprobas vian konduton k deziras longan daŭron de viaj gvidado k laborado."

*

"... Mi bone komprenas la "rabeman" politikon de K-doj Drezen k ceteraj "kolonoj" de sovetia esp. movado. Mi bone memoras la vortojn de K-do Drezen, kiujn li diris raportante pri la 9-a kongreso al la kunveno de la Moskva aktivularo. Mi citas ilin ne laŭvorte, sed laŭsence k proksimume ĝuste. Jen estas ili: "SAT estas 'flaveta' organizo, ĝi estu nia *provizora* restadejo k SEU DEVAS AKCELI LA ESTONTAN GVIDADON K SUPERECON JE LA TUTMONDA LABORISTA ESP. MOVADO" ... Por SAT, kompreneble, estos granda frapo perdi 1700 SAT-anojn, 1100 abonantojn al "S-ulo" k 400 abonantojn al "LNE" k kelkmilojn da rubloj restontaj por SEU-kaso. Tio estas por SAT, sed kio estos por ni — 1700 SAT-anoj, 1100 abonantoj al "S-ulo" k 400 abonantoj al "LNE"? Kio estos al ni, karaj K-doj? Ĉu SEU (eble ĝi nomiĝos TEKU!) povos doni al ni ion similan al "S-ulo" aŭ al "LNE"? — mi dubas, ĉar nur en la fino de junio mi ricevis la "cirkuleratran" Bultenon (aprilomajo*) k pri dua n-o de "Mejdunarodnij Jazyk"** mi ankoraŭ aŭ jam ne revas. Tuta nia legaĵo estas "Komunista Biblioteko", sed ja ni sufiĉe bone povas legi la samon en la rusa lingvo. Sed al kiu ni propagandos niajn sovetiajn ideojn, ĉar ni ne havos interligon kun cetera mondo? ... Ĉu do CK SEU ne povus pruvi al la financkomisaro la sekvojn de ĉi malpermeso je evoluo de lab. esp. movado? Certe povis, sed, mi diras tion antaŭ la tuta SAT-anaro, ne volis. Jes, ne volis, ripetas mi.

"Tial mi laŭtege protestas la inertemon de CK SEU rilate al la malpermeso de finanzkomisaro. Tial mi vokas ĉiujn SAT-anojn el Sovetio postuli, ke CK SEU akcelu akiri la permeson konstantan, aŭ almenaŭ transpagi al SAT monon restantan en Moskvo, aliel ... sed, bedaŭrinde, nia esperanto ankoraŭ ne posedas tiajn esprimojn, per kiuj oni povus stampi la agmanieron de K-doj el CK SEU. Ĉion diritan de ili por sin pravigi mi ne kredos."

Ni povus daŭrigi tian citadon, tial ke ni posedas ankoraŭ aliajn samspecajn leterojn de Sovetiaj K-doj. La ĉi supraj citoj sufiĉas por pruvi, ke nia hipotezo pri ne ĝusta informiĝo ĉe la koncerna Instanco en Moskvo estas ne de ni elpensita. Direkcio de SAT.

Postskribo. Je la dato de 18. julio nia Administranto sciigas nin, ke ĝis tiu tago li ne ricevis pagon el Moskvo, k ke ankaŭ la presejo ne ricevis tian.

Direkcio.

---

[9] *Kompreneble ni prisilentis multon: tempo k loko ne ĉiam ebligas diri ĉion. Ni ankaŭ prisilentis, ke ni proponis al K-do Dem. je 30. 4. 30 (laŭ instigo de nia Administr.) dungi en Moskvo oficiston por prilabori la SAT-admin. aferojn, k ke K-do Dem. respondis al tio en let. de 8. 6. 30, ke dungon de tia oficisto li opinias nenecesa! Ni ankaŭ ne konigis al la SAT-anaro, ke K-do Demidjuk, elektita kiel Plenumkomitatano de SAT en decembro 1929 k ricevinta de tiu tempo regule niajn cirkulerojn k kunsid-protokolojn, neniam respondis k konigis siajn opiniojn k konsilojn al ni (ĝis junio 1930), same kiel li al niaj insistaj leteroj, en kiuj ni proponis presigon de libroj en Moskvo, de 12. 2., 30. 4., 27. 5. trovis tempon respondi nur je 8. 6. 30!*

Sed la supra "propono" restas ankoraŭ nun propono k ne per proponoj ni povas pagi al la presejoj en Leipzig k en Paris.

[10] *Al tiu punkto respondos mem K-do Revo, se li opinias tion necesa. Kvankam ni ne havas ian ajn motivon por defendi K-don Revo, kiu voĉdonigis proponon entenantan ian mallaŭdon al la gvidado de "S-ulo", ni devas tamen rimarkigi, ke ne tiu K-do en Göteborg k en Leipzig defendis la faman programprojekton, kontraŭ kiun devis batali siatempe la Direkcio.*

* La plejparte esperantlingva monata eldonaĵo de SEU.

** La ruslingva dumonata eldonaĵo de SEU.

EL LA REDAKTEJO

Okaze de kongrespropono 16-a, presita en n-o 303-a ni sentas la neceson klarigi al kunlaborantoj k legantoj, kiel funkcias la elekto k uzado de l' manuskriptoj ricevitaj. Ĉiu komprenos laŭ tio, ke estas neeble por la redaktoro, plenumi la deziron de l' proponinto: sciigi tute precize k garantie en la rubriko "Nia Poŝto" tuj post ricevo de manuskripto, ĉu k en kiu n-o ni ĝin uzos. Imagu al vi, ke ni promesus aperigi iun artikolon en difinita n-o, k ĝuste en lasta momento antaŭ aranĝo de tiu n-o ni ricevus tre gravan materialon pri ia aktuala problemo aŭ okazintaĵo, kiu devigus nin prokrasti la antaŭe ricevitan manuskripton! Tio tre ofte okazas en la praktiko, ke ni prokrastas iun taŭgan, bone verkitan manuskripton pro manko de loko, k same ankaŭ okazas, ke ni fine tute ne povas aperigi ĝin, se abunda material-alfluo daŭras. Ĉiu estu almenaŭ konvinkita, ke la gvidanto de "S-ulo" prijuĝas la materialon

---

PRO MANKO DE LOKO

en tiu ĉi lasta antaŭkongresa n-o ni estas devigataj prokrasti la kurantan Fak-Paĝon. Red.

uzatan ne laŭ personaj ŝato k preferoj, nek laŭ la belaj akompanvortoj de l' sendinto, sed nur laŭ la grado de ĝia valoro k uzeblo por nia gazeto.

Se ni agus laŭ la propono de l' Zeista K-do, oni baldaŭ havus motivon nomi la redaktoron promesrompanto. Preferinde ŝajnas al ni ne doni firman promeson pri enmeto, k precipe ne pri la uzo de iu artikolo en difinita n-o, kio estas tute necertigebla. Vi ofte legis en "Nia Poŝto": "Ni uzos vian artikolon en okazo de bezono." Tio signifas, ke ni principe ĝin akceptas, sed ke ĝi aperos nur, se ni ne ricevos intertempe tro da freŝa, kuranta materialo pli grava k tial pli enmetenda. Ne malofte okazis k kredeble ankoraŭ okazos, ke ni havas dumtempan mankon je taŭgaj manuskriptoj. Tiam venis la vico por tiuj artikoloj, kiuj antaŭe pro troo da materialo devis esti prokrastataj. Ideala artikolo por "S-ulo" estu ja verkita tiel, ke ĝi estas leginda k vekas intereson ankoraŭ post monatoj . . . *N. B. (Redaktoro).*

PROPONOJ AL LA 10-a KONGRESO

17. La Jarlibro de SAT restu ĝis plue tia, kia ĝi estas nun, t. e. aperu entute ĉiuj adresoj SAT-anaj. — *Motivigo:* Estas konstatite, ke multaj el ni pro specialaj vidpunktoj ŝatas la aperigon de l' adresoj. Tiu, kiu ne deziras sian adreson en la Jarlibro, indiku sian SAT-anecon per nura matrikulo. La direkcianoj mem ja persone opiniis preferinde lasi la adresaron en ĝia ĝisnuna formo k estis subtenataj en tio per multaj rezolucioj k deziresprimoj de SAT-rondoj k izoluloj (vd. protokolon de la 9-a Kongreso). Jarlibro kiel kompleta adresaro tute ne aspektas tiom seka kiel suspektata. La aperigo de l' adresoj ĉiumembraj estu instigilo al pli da aktiveco. Ĉiu SAT-ano sentas sin kiel ero de tuto en nia mondskala organizo k rajtas k devas konigi sin kiel batalanton por nia movado (escepte K-doj el terorlandoj). Se nepre nia Jarl. estu reformata kiel enciklopedia verko, tiam ni devas starigi la demandon, ĉu la Direkcio krome eldonos specialan adresaron je kostoj de la membraro mem — kio jam ne estos efektivigebla. Ĉiu membro estu SAT-peranto.

SAT-anaro Düsseldorf (Buna, 3789).

18. Leginte la 2-an proponon al la Kongreso, ni deklaras, ke la Jarlibro konservu la tutajn adreslistojn de SAT-anoj el tutmondo, ĉar aliel la Jarl. anstataŭ helpilo fariĝus netaŭgaĵo.

Barcelonaj SAT-anoj 6187, 12 028, 12 513, 14 570, 16 123, 8358, 2496, 9600, 357, 356, 15 622, 14 571.

19. Ĉar SAT ne estas negoca entrepreno, kun celo nur havi multe da mono en kaso, ni zorge devas iel kontroladi la aliĝon de novaj membroj. Stulta estus la persista averto pri nemontro de l' Jarlibro, se kiu ne meritas vidi ĝin, povas posedi ĝin plenrajte aliĝante, sen ia kontrolo, nian Asocion per, kiel sola kondiĉo, pago de kotizo. Ni tial proponas, ke aliĝoj okazu nepre nur pere de la loka SAT-rondo. En lokoj, kie loĝas neniu membro, la aliĝonto sin turnu al plej proksima SAT-anaro aŭ sendu en la Administrejon ateston de sindikato, societo aŭ partio laborista, kiel pruvon pri sia indo k fidindo trapaŝi la sojlon de nia organizo, kies ĉefa tasko estas klerigadi, sed nur tiujn, kiuj meritas tian klerigon k lojale ĝin uzados.

Je la nomo de l' Valencia SAT-anaro L. Hermandez (12 916).

Subtenas Barcel. K-dôj 884, 2496, 9600, 357, 14 571.

20. El niaj horzonoj plej multe loĝataj estas la zonoj 0, 1, 2, 3, 5, 6, 7, 8, 9 (Eŭrazio, Afriko) k 17, 18, 19 (Ameriko). Tial ĉi zonoj havu po 2 reprezentantoj en Ĝen. Konsilantaro (po unu el norda k suda parto de ĉiu el la cititaj zonoj). Ceteraj 12 zonoj, pli malmulte loĝataj, havu kiel nun po unu reprezentanto. Tiel tuta Ĝ. K. devas havi 36 anojn. *Krjukov (1897).*

21. Nia plej supera organo portas tre longan, maloportunan derivitan nomon *Ĝenerala Konsil+ant+aro de Sennacieca Asocio Tutmonda.* Krom tio la nomo ne bone distingas proletan karakteron de l' organo. Mi proponas anstataŭi ĉi nomon per la pli simpla k distinga *SAT-soveto.* La vorto *Soveto* en la senco *konsilantaro proleta* estas internacie uzata jam delonge.

Krjukov (1897).

22. Por utiligi la SAT-monon troviĝantan ĉe SEU k ebligi al niaj sovetiaj K-doj pluan abonon al SAT-eldonaĵoj, la periodaĵoj de SAT estu presataj en USSR, minimume, ĝis la troviĝanta en Moskvo mono elĉerpiĝos k, se eble, daŭre. La kongreso komisias Plenumkomitaton k Administracion, tuj entrepreni la necesajn paŝojn. *SAT-ano 10 272.*

"KOLĤOZO FAJRERO"

La 18-an de majo Nimes-a Lab. Esp. Grupo, gvidata de K-do Salan, inaŭguris sian *kolĥozon.* Tiel ni nomas kamparbienon akiritan, antaŭ tri monatoj, de la grupo, por ke ĝiaj geanoj povu renkontiĝi dum liberaj horoj por praktiki esp-on. Tiu bieno troviĝas je ĉ. 3 km de l' centro de la urbo. Ĝi konsistas el duĉambra dometo k 44-ara[1] grundo, sur kiu kreskas 150 oliv-, migdal- k figarboj. Antaŭ la dometo staras 5 cipresoj. Supre de masto fiksita ĉe unu el tiu cipresoj flirtas la ruĝverda flago de l' grupo. Terpecon oni platigas por kurado, saltado k manaŭ piedpilkludado. Sur la enirpordo de l' bieno estas pentritaj jenaj vortoj: "Kolĥoz Fajrero — Proletoj ĉiulandaj bonvenintaj!" SAT-stelo meze de l' pordo signas, ke kiu eniras, gastiĝas sur SAT-teritorio. La bieno estas akirita dank' al fervora sinoferemo de l' grupanoj. Ĝi estas komuna propraĵo de l' grupo k laŭ niaj aranĝoj ĉiam restos tia. Multajn penojn k ŝviton elspezis la Gek-doj por komforte ordigi domon k grundon, tiel ke nun ni povas fieri pri belaspekta k enviinda kunvenejo. La inaŭguron ĉeestis kelkaj Nimes-anoj, kiujn bone impresis nia kolĥozo k sukcese trafis nia propagando. Ni havas firman esperon, ke ni ne vane fordonis niajn penon, monon k ripozon. Ni ja nun posedas valoran bazon por estonta agado. Vizitontoj konstatos, ke ni ne blufas k jam rezultoj de plurjara senĉesa agado evidentiĝas. Al ĉiuj SAT-rondoj ni konsilas imiti nian ekzemplon, konvinkitaj, ke tiel nia afero rapide progresos. Taŭgu nia raporteto kiel invito al la tuta SAT-anaro pasigi sian libertempon en nia komuna "Kolĥozo Fajrero". *Nimes-a Lab. Grupo "Fajrero".*

[1] Aro = 100 kvadratmetroj.

RECENZEJO ◆

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

The Workers' Esperanto Movement by *E. Lanti*, translated from esperanto by *H. Stay*. N. C. L. C. Publishing Society, Ltd., 15 South Hill Park Gardens, *London NW 3*. Prezo: 6 pencoj.

Ĉi tiu broŝuro konsistas el la angla traduko de la jam fama verketo de K-do E. Lanti: *La Laborista Esperantismo.* Ĝi do ne bezonas longan recenzon, ĉar sendube multaj legantoj jam konatiĝis kun la originalo. Necesas tamen noti, ke la tradukinto, K-dô Stej, sciigas, ke li tradukis laŭ teksto korektita de la aŭtoro por eventuala dua esp. eldono. Sekve la anglalingvanoj, kiuj jam legis la espan tekston, havos profiton legi ĉi tiun tradukon.

Kio ŝajnas al ni speciale notinda k grava, estas la fakto, ke la eldona firmo ne estas esperanta entrepreno. La "National Council of Labour Colleges", kiu jam eldonis diversajn gravajn verkojn k ĉiumonate la revuon "The Plebs", estas jam bone konata de niaj SAT-edukistoj; sekve ne necesas insisti por ke ĉiu komprenu la specialan signifon de la eldono de tiu broŝuro fare de tiu grava eduka organizo en Britio. *N. B.*

Ĉu vi jam pagis vian kotizon por la jaro 1930? Se ne, tuj faru tion!

NIA POŜTO

J. Ege. — La malampleksigo de l' gazeto malebligas la enmeton de via artik.

12 896. — Ni rezervos vian artik. por iu n-o de "LNE" (scienco).

1225. — Via verketo taŭgas nek por "S-ulo" nek por "L. L.". *Red.*

7046. — Vi nur povas rekte mendi en L.

Al multaj! — Kiam vi sendas monon, notu la celon de via pago, aliel via mendo ne estas plenumebla.

16 273. — Tiun ĉi sistemon oni uzas pro la koncizo k dokumentigo de la membreco.

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

10 573. — 60 lev. estas ne sufiĉaj, mankas 10. Krome viaj monbiletoj estas tiom malpuraj, ke oni sentas vomemon. Estonte sendu bonajn.

15 738. — Ni ne kulpas. "SPR" estas eldonata en Moskvo kaj ni mem ne ricevis la duan.

Sovetianoj! — Tute ne helpas al ni, se vi sendas monon al CK SEU kaj ni ne povas ricevi ĝin. Ni ne povas plenumi mendojn sen mono. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-dino Amalie Heinz (anonco en 296) petas pardonon pro neresp., al ĉirkaŭ 60 ric. koresp-aĵoj. Financaj kaŭzoj ne permesas tion. Dankon!

K-do Franz Hermann, Breitestr. 3-a, *Diemitz b. Halle,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Certe resp.

— Ĉelo de ŝumaŝin-fabriko koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Adr. Willi Alt, Damaschke-Anger-Str. 94, *Frankfurt am Main, 21.*

K-do Josef Becka. Odoakergasse 21, *Wien XVI,* PI kĉl. Resp. garant.

K-do Johano Ĉristamentl, Wiener Str. 74, *Wiener-Neustadt,* kĉl, pri div. temoj, PI, PM, bfl.

BRITIO

— 36-j. anglo volas amikiĝi kun ialanda K-dino por pliposte kunvivi, interŝ. fotojn, L. Adr.: W. P. Reed, 8 Claremont St., Stapleton Rd., *Bristol.*

K-do J. R. Duncan, 64 Kemback St., *Dundee,* kun Sovetianoj, por perfektigi sin en la lingvoscio esp.

— Kongresanoj, kiuj interesiĝas pri nudismo skribu al: K-do Harold Kear, 21 Anerley Park, *London, SE 20,* por ke faka kunveno okazu dum la kongressemajno.

BULGARIO

— *Atentu Sovetiaj K-doj!* — 2 klaskonsciaj bulg. SAT-anoj petas la tieajn K-dojn helpi al ili, por ric. enirvizon sovetian. Bonv. tuj skribi al: Blagoj Pavlov, Kvartal "Hristo Botev", 10, *Plovdiv.*

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Karl Štekl (15 618), Tichá str. 5, *Plzen, 9,* pri propagando, laboroj de LEA-oj, kursgvidado, instrumetodoj k. a. temoj.

FINNLANDO

K-do Svante Unelma (24 j.), *Turku, postit,* interŝ. fotojn, PI, kĉl.

FRANCIO

K-do Gr. Parizel (facetisto), 141 rue de Charonne, *Paris XI-a,* kĉl, PK, PI, bfl.

— Lab. Esp. Grupo en *Villejuif,* kiu je sia anonco ricevis pli ol 50 L k PK bedaŭras ne povi respondi ĉiujn skribintojn. Dankon k saluton al ĉiuj — P. Boisson, rue Voltaire, Villejuif, Seine.

GERMANIO

Gek-doj Göttling, Münzstr. 15, *Braunschweig,* serioze koresp. kĉl, PK, PI. Tuj resp.

K-do Kurt Schmeisser, Am Bahnhof, 61-c, *Dahlen i. Sa.,* interŝ. diversspec. PM kĉl, kontraŭ PM de Saarlando, Dancigo, Germanio. Resp. garantiata.

— LEA-grupo Mannheim koresp. kun USSR, Azio, Hispanio, Meksikio. Skribu al: K-do Rudolf Weiner, Zellerstr. 51, *Mannheim.*

HISPANIO

— Germana K-do loĝanta nun en Hispanio koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: K-do Fritz Köhler, str. San José, 20, Piso 3—0 Izg., *Sabadell.*

HUNGARIO

K-dino R. Kluger, Bosskaystr. 30-a, *Rakospalota,* kĉl, pri seriozaj temoj.

JUGOSLAVIO

K-do *Mate Lovriĉ* (fraŭlo 27 j.), Preradoviĉeva 17, *Zagreb,* kĉl, pri ĉ. t.

SOVETIO

— Viglan Korespondadon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. temoj kĉl. Adr.: Ukrainio, Kremenĉug, Pedagogia Teknikumo.

— Sportuloj de grandega Moskva Klubo "KOR" (stadion) kor. k interŝ. fotojn k gaz. kun proletaj sportorganizoj pri piedpilko, volejpilko, korbpilko k manpilko (laŭn-teniso), *Moskvo,* Kalanĉevska placo, Klubo "KOR"-Esp.

— Gelaboristoj de granda apudmoskva fabriko kor. kun gelaboristoj de la tuta mondo pri lab. vivo, laboro k okazonta 5-a internacia kongreso de Profintern. *Fili-Pokrovskoe* Moskovskoj Oblasti, Klubo je nomo de Vorovskij. Esperanto.

— Gegrupanoj de poŝta fako kor. pri ĉ. t. kĉl, tuja respondo. *Moskvo 55,* Paliĥa 55 poŝta otdelenie. Esperanto al K-do Maksimov.

K-dino Mario Osadĉenko, *Moskvo,* Raboĉaja ul., n-o 19/1, kv. 32 (Rogoĵskaja Zastava), kor. kĉl.

K-dino Sofia Golod (18-jara), *Moskvo,* Dokuĉaev per. n-o 15, kv. 2 (Domnikovska) kĉl ĉiuteme.

K-dino E. A. Dmitrieva, *Moskvo 20,* ul. 5-a Sokolinaja gora, 17, kb. 1, kĉl ĉiuteme. Nepra respondo.

K-dino Valentino Buŝmarina, *Tver,* Ptaŝkino boloto, n-o 45, kor. kĉl, pri ĉ. temoj PK.

URUGRAJO

K-do Eŭgenio Rezzano, St. Garzon 18, *Paysandu,* sciigas al siaj gekoresp-antoj, ke superakviĝo de Urugvaja rivero detruis lian koresp-aĵaron, pro tio li povas resp. al neniu.

USONO

— Pro 2, eble ankoraŭ pro 3—5 monata senlaboreco mi devas ĉesi koresp. Sed foje hektografitan L mi resp. — Se iu pri WIR-anonco plendos k Kertesz ne resp. tiam skribu al mi. Adr.: Louis Nagy, 1163 Mechanicstr., *So. Bethlehen. Pa.*

— Mi petas miajn gekoresp-antojn ne sendi gravajn L, fotojn k dokumentojn en la nun eldonitaj SAT-kovertoj. La nuna speco, precipe kun dika enhavo, alvenas en tute difekta stato. Pro tio mi supozas perdiĝon de kelkaj L. — K-do R. Bonesper, *New York,* City.

Letervespero

La 11-an de septembro ni aranĝos letervesperon. Gek-doj, ni atendas viajn skribaĵojn. Respondo garantiata. "Prol.-Esp.-Gr., Dresden-Striesen", Wasserturmstr., Rest. "Krone", *Dresden-A.*

Pruvu la valoron de esperanto!

En marto de 1927 pro politikaj persekutoj en Litovio elmigris Sovetion (Moskvon)

K-do STEFANO MAKARAŬSKAS
(Makarovski)

pri kiu ĝis nun nenion scias liaj gepatroj, frato k ni, liaj K-doj. Ekzistas famoj, ke li estis en Sovetio arestita, juĝita k kondamnita pro perfido (?!). *Sovetiaj K-doj!* Inter vi certe ekzistas personoj, kiuj scias aŭ povas ekscii pri juĝejaj k GPU-aferoj dum tiu tempo. *Diru veron pri tiu K-do!* Ĉion skribu al J. M. Dagys (SAT-ano 5738). Adreso: Litovio, *Kaŭnas,* Universitetas, Gamtos Tyrimo Stotis.

ENHAVO

	pago
Londono — Oksfordo	487—88
La abomena militismo	488—89
Publika letero al la Literatura Komisiono	489
Diskutejo	489
La klasbatalo tra la mondo	489
Tra Esperantio	490—94
Korespondado	494

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)